

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu  
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 6-a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 651, 1976.03.31 & 04.03

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia prelegaro pri la peresperanta instruado de la gepatra lingvo ni hodiaŭ ekzamenos, kiel studi tekston antaŭ ol komenci ĝin traduki nacilingven.

A.- La pasintan semajnon ni legis al vi kelkajn fablojn el la verko **Ezopa Saĝo** de Kolomano Kalocsay dirante, ke tiuj ĉi poemetoj formas taŭgan enkondukon al la esplorado de la esperanta belestro. Ilin ŝatas gelernantoj ekde la deka jaraĝo. Ni prenu kiel ekzemplon la fablo **Leona divido** :

Cl.- Foje la lupo kaj la vulpo kaj la kat'  
kun la leono sin federis por ĉasad'.  
Grandkorpan cervon predis la ĉasanta kvar',  
kaj la leono ĝin dividis per deklari' :  
« Leono mi estas : Mia la unua part'.  
Plej forta mi estas : Mia do la dua part'.  
La trian rajtas mi : La plej kuraĝa best',  
kaj ve al tiu, kiu tuŝos al la rest' ! »

A.- Oni komencu per leksika studo. Estas interese fari la liston de la vortoj, kiuj ne troviĝas en la gramatika kategorio donita en la **Plena Vortaro de Esperanto** aŭ en la **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**, notante kaj la difinon de la radikoj, kaj la signifon de la derivaĵo. Por tiu ĉi 60-vorta teksto la gelernantoj malkovros 12 vortojn derivitajn, tio estas la kvinono de la vortmaterialo. Estas tipa karakterizaĵo de esperanto, kiu klarigas, kial tiu ĉi lingvo aglutina ne havas longajn vortojn kiel la aliaj aglutinaj lingvoj. Ni donu la liston de tiuj ĉi 12 vortoj kun la derivaĵoj troviĝantaj en la fablo **Leona divido** :

Cl.- Ni tuj rimarkas **leono** el kiu Kalocsay formis **leona**, sekvas **dividi – divido ; fojo – foje ; ĉasi – ĉasado, ĉasanta ; korpo**, kiu permesas formi la adjektivon **grandkorpa ; predo – predi**. Koncerne tiun ĉi verbon la gelernantoj malkovros, ke la donita ekzemplo en la vortaro ĝuste estas verso el la fablo **Leona divido** :

A.- « Grandkorpan cervon predis la ĉasanta kvar' . »

Cl.- **Kvar'** aŭ **kvaro** deriviĝas de **kvar**. **Deklari** donis **deklaro ; mi** la adjektivon **mia ; unu - unua ; du - dua ; tri - tria ; rajto - rajti**, fine **resti - resto**.

A.- Nur per konsulto de la vortaro la gelernantoj povas fari tiun ĉi unuan ekzercon. Petante ilin kopii la difinon de la radikoj kaj de la derivaĵo oni devigas ilin vere kompreni la signifon de tiuj ĉi vortoj sen uzi helpon de la nacia lingvo. Ni ne forgesu, ke tre ofte la infanoj ne konas la nacilingvajn ekvivalentojn de la esperantaj derivaĵoj. Pro tio traduk-laboro en tiu ĉi etapo de la studo estus absolute vana.

Cl.- Post tiu ĉi leksika studo de la teksto oni iru al diskuto en esperanto pri la koncerna fablo. La instruisto faras precizajn demandojn, al kiuj la gelernantoj unue kolektive kaj poste individue respondos. La kolektiva laboro estas parola, la individua skriba.

A.- Jen la demandoj, kiujn oni povas fari koncerne la fablon **Leona divido** :

Cl.- Kiuj formas la ĉasantan kvaron ?

Kiu estas la plej forta ?

Kiu dividas la predon ?

Ĉu la leona divido estas justa ?

Kiom da partoj faris la dividanto ?

Kiun parton ricevis la kato ?

Kiom da bestoj estas menciitaj en la fablo ?

Kion personigas la leono ?

Kiom da ĉasintoj nenion ricevis ?

Kion volas instrui la fablisto en tiu ĉi poemo ?

Ĉu vi konas aliajn fablojn de Kalocsay, kie agas leono ? Donu la titolojn !

Ĉu vi konas fablojn de Kalocsay, kie vulpo agas ? Donu la titolojn !

A.- Por pretigi la parkeran asimiladon de la fablo, oni povas anstataŭi ĉiun version per simboloj : la unuan version per la bestoj lupoj, vulpo kaj kato ; la duan per leono ; la trian per cervo. Poste ĉiu verso estas anstataŭigebla per kvarono de la predo. La infanoj, irante de simbolo al simbolo provas reciti la fablon. Hejme ili definitive parkeros la fablon. Kaj nun la teksto estas tradukota. Sed unue oni recitigos la gelernantojn, kontrolante ĉu ili vere ĉion komprenas. Oni povas amuziĝi serĉi en la vortaro ĉiujn vortojn formitaj ekde la radikoj **ĉasi**. En la fablo jam troviĝas **ĉasado** kaj **ĉasanta**. En PIV oni malkovros **ĉasaĵo**, **ĉasejo**, **ĉasisto**, **ĉasoleopardo**, **ĉaspelantoj**, **ĉasputoro**, **ĉasosako**, **ĉasosekvi**, **kurĉasi**, **ŝtelĉasi**.

Cl.- Oni povus aldoni la vortojn **ĉasanto**, **ĉasato**, **ĉasinto**, **ĉasito**, **ĉasonto**, **ĉasoto**.

A.- Kaj nun alvenas la grava momento de la transskribo de tiu ĉi fablo **Leona divido** en la nacian lingvon. Pri la traduko nacilingven ni parolos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!